

## & Dolorosa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Antonín Klašterský. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida baldo ..>

### (#Melodio:

<1,6:29> (/mi mire redo dodo dodo dore mimi; mi mire mire mimi soso fami mimi;  
(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o))×8 )+

### (&Strofoj:

'1 /Kun infanet' malsana apud urba muro ; eksidis la patrin' kaj vidis kun teruro,

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 la fortoj de l' ideto ŝia, kiel svenas, ; spirado kiel ĉesas kaj la fino venas - .....

'3 kaj de okuloj ŝiaj rulas larm' post larmo. ; Jen preterpasis Kristo inter homa svarmo. ....

'4 Ŝi al li manojn levis kun sincera peto: ; "Sinjoro, proksimiĝu, helpu al ideto, .....

'5 ĝi, vidu, mortas jen, kaj vi miraklojn faras." ; Kaj Krist' tuj proksimiĝas kaj pensante staras. ....

'6 Li vidas lignan krucon, sur ĝi sian finon, ; apude dolorĝemi, plendi la patrinon: .....

'7 Li vidas, kiel sangas, krevas ŝia koro, ; sed help' ne venas al ŝi en ĉi-tiu horo .....

'8 kaj oni eĉ ridegas je doloro vana. ; Li tuŝis la infanon kaj ĝi iris sana. ....)